

Kulturaj Kajeroj

E.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoi

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1982 - 2

KULTURAJ KAJEROJ

1982 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Pri ina vivsorto dum mezepoko kaj renesanco (fino) — S. Boniol

Fruktoj de la spaco (Revoluciaj materialoj) — S. Guillot

La tri senkantaj mesoj — A. Daudet trad. A. Ribot

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

Kiam ankoraŭ knaris vagonaro inter Le Mans kaj Saumur multaj vizitantoj de la Esperanto-Domo uzis la fervojon por vojaĝi. La vojaĝintoj estis akceptitaj sur la kajo kaj, ĉar ili kelkafoje estis multaj, du aŭ tri aŭtomobiloj transportis la valizojn dum la alvenantoj piediris. Benita tempo ! Ĉar kiam la vojaĝintoj fariĝis forirantoj ili estis akompanataj ĝis la stacidomo de grupo da amikoj. Ne gravis ĉu la vagonaro malfruis ĉar la atendadon plenigis kantoj kaj eĉ dancoj. La alvenantoj iom surpriziĝis.

Iam tri personoj alvenis per la sama vagonaro. Estis eble veturigi ilin kaj la valizojn. Du estis eksterlandanoj, unu franco. « Vi estas bonvenaj. Ne tro lacaj ? Ĉu la vojaĝo estis longdaŭra ? » k.t.p. La kutima unuakontakta konversacio okazis dum la mallonga irado al la kastelo.

Ĉe la alveno, jam staris sur la perono kelkaj personoj, kiuj salutis la alvenantojn. Alproksimiĝis la horo de la tagmanĝo kaj iu kondukis la novajn ĉeestantojn al iliaj ĉambroj. La Franco, S-ro M., altstatura, 60 jara, grizhara viro aliĝis iom malfrue kiam ne plu restis libera eĉ unu unulita ĉambro. Li ricevis dulitan ĉambron sed oni promesis al li, ke neniu alia loĝos en lia ĉambro. Li estos sola.

La koncernita periodo daŭris du semajnojn. Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj vizitis la kursojn kaj partoprenis en la diversaj aktivaĵoj. Ankaŭ S-ro M. kiu eĉ helpis la malgrandan grupon, kiu senfadenigis la verdajn fazeolojn. Li ne aktive partoprenis en la komunaj ĝojaj aktivaĵoj sed li ŝajne ĝuis la etoson « Ĉu plaĉas al vi la restado ? Ĉu vi havas petojn por fari ? » S-ro M. ĉiam respondis, ke ĉio estas en ordo. Senproblema homo.

Venis la tago de disiro. Unuaj adiaŭoj sur la perono. Veturado al la stacidomo. Kantoj sur la kajo. Alveno de la vagonaro. Lastaj adiaŭoj... De la vagonfenestro S-ro M. signas al la respondulo, kiu akompanis la forirantojn kaj flustre diras al li en la siblanta vaporo de la ekironta vagonaro : « Ĉio estis perfekta. Sed oni forgesis diri al mi, ke mi devis alporti miajn littukojn ». La kapo de la respondulo pleniĝis je granda demanda punkto. « Kial li ne diris pli frue ? Kial oni ne kontrolis la laboron de la servistinoj ? Ĉu ankaŭ aliaj ĉambroj ne estis preparitaj ? ».

Ĵus haltiginte la aŭtomobilon ĉe la perono la respondulo suprenkuris la ŝtuparon al la ĉambro de S-ro M. Jes : S-ro M. dormis en sentuka lito. Kiel tio povis okazi ? Rigardante la alian liton la respondulo konstatis, ke tiun oni pretigis, ne la alian kaj ke S-ro M. eraris. Li dum du semajnoj ne rigardis ĉu sub lia valizo kaj lia mantelo ne kuŝis tute preta lito.

Ankaŭ la esperantistoj estas foje nescivolaj.

Esperanto tra la Mondo

Pri la Universala Kongreso en Antverpeno :

— Internacia Infankongreseto estas antaŭvidita.

— Grava ero de la kongresa programo estos la « Tago de la lernejo », kun, matene, tri prelegoj pri : « Studado de dua lingvo », « Metodiko en la praktiko », « Esperanto-ekzamenoj kiel finpunkto en la lernado ». Posttagmeze, okazos serio de modellecinoj, prezento de « Lingvolernado per komputilo » kaj podia diskutado.

Ĉinaj eminentuloj kreis « Amikoj de Esperanto » en Beijing :

Dum Decembro, en Beijing (Pekino), pli ol 150 personoj, eminentaj reprezentantoj de la intelekta, universitata, politika medioj, kunvenis okaze de la inaŭgura manifestacio de la asocio « Amikoj de Esperanto ». Samtempe, oni eksciis la fondon de esperanto-eldonejo kaj de porinstrua esperanto-kurso, sub sankcio de la Eduka Ministerio. La unuaj 20 junaj instruistoj kiuj lernos dum unu jaro venas el diversaj ĉinaj lokoj kaj revenos poste al sia lernejo por instrui la lingvon.

La kreado de novaj kursoj en diversaj ĉinaj altlernejoj ankaŭ konfirmas la nunan disvolviĝon de nia movado en Ĉinio.

Hinda Unio havas nun sian esperantan federacion :

Komence de Februaro, 25 reprezentantoj de diversaj esperanto-grupetoj el ĉiuj partoj de Hindio venis al Vijayawada, en la centra parto de la lando, por fondi « Federacio Esperanto de Bharato » (Hinda Unio), eble parte frukto de la malfacila agado (antaŭ 20 jaroj) de nia forpasinta samideanino Madeleine Haudebine en tiu lando.

Ankoraŭ ĝojiga signo de la plivigliĝo de esperanta vivo en la « Tria mondo », por kiu la helpo de la esperantistoj de la industriaj landoj estas ege necesa je ĉiuj niveloj. Pri tio, estas bone signali ke jam grupo de japanaj esperantistoj efike laboras por helpi la movadon en Azio.

Cetere, oni plie anoncas esperanto-kurson en katmandu (Nepalo) kaj novajn kursojn en Taipei (Taiwan).

La korea asocio publikigas belan ilustritan revuon.

Alvokoj por helpo el Sud-orienta Azio :

— El Vjetnamo, lernolibroj kaj korespondantoj estas petataj de S-ro Ngô-Chan-Ly, Vjetnama Esperanto-kurso, 539/TK2/20, Tran-Hung-Dao, T.P. Ho-Chi-Minh (li malfermis tri esperanto-kursojn).

— S-ro Nguyen Dô Kahn (173-A, Vovan-Tân-Quân 3, T.P. Ho-Chi-Minh) petas materialon por desegnado kaj pentrado por esperanto-kurso en infana domo en Hanojo.

— Lernolibroj, esperanto-materialo (ankaŭ en franca lingvo) estas petataj de S-ro Navouth, Ministère de l'Education Nationale, Pnom-Penh, Kampuĉio, kaj de S-ro Waterinsak, Ministère des Affaires Etrangères, Vientiane, Laoso.

27 ambasadoroj de nealiancitaj landoj por Esperanto :

Nia amiko Tibor Sekelj intervjuis ambasadorojn de « nealiancitaj » landoj en U.N. kaj U.N.E.S.K.O. El 28, 27 faris tre favoran deklaron por la oficiala uzo de Esperanto.

Esperanto kaj turismo :

Turismo, post la favora rezolucio pri Esperanto en la Monda Turisma Konferenco, aperas kiel unu el la plej esperplenaj kampoj por la praktika agado de nia movado.

La lasta numero de « Esperanto-Turismo » organo de « Monda Turismo », eldonita de « Eŭropa Esperanto-Centro » en Bruselo, alportas interesajn novaĵojn. Interalie, pro la sperto akirita en Nederlando pri la aranĝo de vojaĝoj kaj turismaj renkontoj por esperantistoj, kontrakto estas aranĝita inter U.E.A. kaj Pola Esperanto-Asocio por tuja starigo de Turisma Servo de U.E.A.

Komputista asocio :

La komputista sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista publikigis sian riĉan bilancon de unujara vivo : teknikaj eksperimentoj de apliko de Esperanto en informatiko, seminarioj, kolektado de pli ol 850 adresoj de komputistoj-esperantistoj el la tuta mondo, publikado de studoj.

La interesatoj povas kontakti la « Komputista Grupo » H.E.A., Pf. 193, H-1368 Budapest Hungario.

Internaciaj Floraj Ludoj :

Kataluna Esperanto-Asocio invitas la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn konkurse konkuri per siaj plej valoraj verkoj en la tradicia beletra trobadora festo kiu celebriĝos en la kadro de Kataluna Esperanto-renkontiĝo 1982. Ekzistas premioj por originalaj poezio kaj prozo.

Informo ĉe la sekretario : Gabriel Mora i Arana, Carrer Carrio 7, 4t, Manresa (Bages), Katalunio, Hispanio.

Novaj eldonaĵoj :

— « Moderna kroatia prozo ». 34 noveloj de modernaj kroataj verkistoj ; 604 paĝoj. Tiu traduko estis lanĉita oficiale en la sidejo de Asocio de Kroatiaj Verkistoj en Zagrebo.

— « Skizo pri Ĉinio ». Enkonduko al la historio, geografio, ekonomio, kulturo kaj politiko de tiu lando. 100 paĝoj.

— « Tutmonda Sonoro ». Du volumoj : 581 poemoj el ĉirkaŭ 30 lingvoj tradukitaj de K. Kaloscaj. Entute 672 paĝoj.

— « Proverbaro franca-esperanta, kun aldono : Esprimoj sankciitaj de l'uzado » de Lucien Bourgeois. Valora verketo por la franclingvanoj.

— « La Gastejestrino » de Carlo Goldoni, tradukita de Carlo Minnaja. Populara komedio de la fama itala teatristo, kun eseo kaj notoj.

— « Aventuroj de Tom Savoyer » de Mark Twain. Tradukis sub formo de konciza bildstria rakonto Vilmos Benczik.

— « La sonetoj / The Sonnets » de W. Shakespeare. Dulingva eldono kun traduko de Auld.

— Tradukoj faritaj de A. Goodheir de klasikaĵoj : « Apologio de Sokrato », kaj « Kritono » de Platono kaj « Prometeo ligita » de Eŝilo.

PRI INA VIVSORTO DUM MEZEPOKO KAJ RENESANCO

(fino)

APERO DE URBA CIVILIZACIO

De la XII-a ĝis la XIII-a jarcentoj urboj laŭvice malligiĝas el feŭda protektado. Ni ne forgesu mencii la subtaksatan, tamen elstaran influon de du revoluciaj teknikaĵoj : la ŝultrojungilo, kiu ebligas la ŝarĝobestojn labori pli efike, kaj la akvomuelilo, kiu malpliigas la pistolaboron. Tiuj du elpensaĵoj ege helpis al inoj, ofte rolantaj en terkultivado kaj grenekspluatado same kiel bestoj.

Civilizacion plejparte kamparan postvenas urba civilizacio ; rangigitan socion anstataŭas socio sur egalrajteco kaj reciprokeco bazita ; unuvorte estiĝas servinterŝanĝa sistemo kaj monrimeda ekonomio. La kavaliroj cedas la lokon al la komercistoj. Ekestas nova klaso : la burĝaro. Tia civilizacia tipo promocias virinon, kiu akiras civilajn rajtojn. Ŝi iom partoprenas en politikaj aferoj. La komunumo kunigas la posedantaron, ĉiu fajrejestro ricevas voĉdonan rajton. Kelkloke vidvinoj kaj senedzaj memstarulinoj partoprenas en komunumaj kunsidoj, sed oni malpermesas, ke ili estu deputitinoj aŭ skabeninoj. Tamen vilaĝaj frataroj viraj foje elektas virinon, kiel estrinon. Dum la ĉiopova korporacia epoko inaj organizaĵoj pere de siaj metiaj juĝantinoj pligraviĝas. Profesiaj eblecoj konsiderinde plilarĝiĝas. Virino plenrajte praktikas sendependan metion aŭ fariĝas asociatino de la edzo. Pli poste reĝaj ordonoj al vidvinoj favoraj permesos, ke ili daŭrigu la edzan aktivecon kaj ĝuu ties privilegiojn. Metiista laboro alprenas familian aspekton : metiisto instruas sian lertecon al la gefiloj ; sendiskute la filinoj envenas la patran laborejon. Sabine von Steinbach, ekzemple, postdaŭrigos la patran laboron, kiel skulptistino en Strasbourg katedralo. Ambaŭseksaj metioj estas multnombraj kaj krom tio oni kalkulas 150 inajn metiojn. Virinoj deĵoras en ĉiuspecaj vestometioj, brodas arĝent- kaj orfadene. Tia ĉefverko, kia estas la fama tapetbrodaĵo en Bayeux muzeo ŝuldiĝas al skipoj da spertulinoj. En teksindustrio ili prilaboras drapaĵojn ĉu hejme, ĉu laboreje, ŝpinas, teksokombas, tinkturas ; tamen estas al ili malpermesite fuli pro troa lacigo. Cetere pli da inoj ol da viroj oni kalkulas en brokantado kaj nutrokomercado. Ankaŭ ledon kaj metalon ili prilaboras, fabrikas tondilojn kaj kudrilojn. Aldone al panfarado, bierfarado, laktopreparado, ili estas gastejestrinoj.

Cetere ampleksa laboristinaro deĵoras en konstruejoj, fabrikas morteron kaj ĉartransportas krudmaterialojn ; eĉ en minejoj ili laboras en Britio dum la XIV-a jarcento, sed iliaj salajroj estas ege pli malaltaj, ol la viraj.

Dank'al sia profesia aktiveco virino akiras iom da klereco. La amaso estas plejparte seninstrua ĉar tiam esti instruata gravas nur por la klerikaro. Ofte en metikontraktoj estas menciite, ke geestroj sin trudas instrui siajn metilernantojn pri legado, kalkulado, desegno, aŭ allasas al ili la permeson frekventi kursojn. En Parizo troveblas privataj lernejoj sur strato « du Fouare » (la nomo devenas el tio, ke oni tie dissternis fojnofaskojn por ke la lernantaro povu sidi). Sed skribado estis taksata tekniko kaj pro tio oni devis sin turni al skribisto. Kutime ekzistis lernejo apud ĉiu katedralo.

Dum la XIII-a jarcento ununura porknabina lernejo estis fondita en Parizo ĉe « rue aux Ours ». Bonhavaj junulinoj estis edukataj en monaĥinejoj kaj oni finedukis ilin hejme dank'al instruistinoj aŭ kapelestroj. (Tiumaniere Fulbert konfidis sian nevinon al Abélard por intelekta klerigado). En Francio oni ne kalkulas studentinojn en universitato sed en Italio ekde la XI-a jarcento ekzistas medicina instituto, kiu aljuĝas diplomojn eĉ al virinoj. Dum la XIV-a kaj XV-a jarcentoj en Francfort, dekkvino da virinoj praktikas medicinon kaj kelkaj famiĝas, kiel okulkuracistinoj.


Ne enprofundiĝante en jurfakan labirinton ni tamen menciu preterpase harhirtigan retropaŝon en Bruĝo dum la XIV-a jarcento : edzo rajtas batpuni sian edzinon, ŝin tranĉvundi de kapo ĝispiede, varmigi siajn piedojn ŝiasange, leĝorompon li ne kulpas kondiĉe, ke li rekudru ŝin kaj ke ŝi tion postvivu...

PRI EKLEZIO KAJ VIRINO

Oni rimarkas ambaŭflankecon kaj konstantan osciladon inter Maria-koncepto kaj Eva-koncepto. La eklezio klopodas rangaltigi virinon, sed samtempe pluigi ŝian jarcentdaŭran regatecon, kiu laŭopinie kongruas kun konvena ordo. La kanonjuro agnoskas ambaŭseksan egal-

rajtecon laŭ spirita vidpunkto, sed precizigas, ke subula estas ina surtera pozicio. Oni ekskludas ŝin el la pastraj funkcioj, ekleziaj juĝejoj, ktp. Oni ne pretekstu bibliajn precedencojn por transpaŝi la regularon : la malnova testamento eksvalidiĝis ; ĝin anstataŭas la graca reĝimo, en kiu pro la prapeko virino kondukis Kriston al la kruco.

Pro tio humila ŝi devas aspekti. Tamen fakte pli granda flekseblecо regas : reĝinoj kaj regentinoj aliras oficojn eĉ spiritajn kun juridikciaj provoj. Kanonjuro strebas limigi abatinajn provojn per vira reganteco (episkopa plejparte) sed abatinoj ja heredis diakoninajn povojn -kelkaj eĉ absolvis siajn monaĥinojn ĉe konfespreno. Abatinoj, kiel dirite, estis veraj ekleziaj altrangulinoj, kunvokante kunsidojn, juĝante eĉ klerikojn pere de siaj konfidatoj. Ĉiuj ni Esperantistoj aŭdis pri la fama abatino Hildegardis, germana mistikulino, kiu la unua prilaboris planlingvon. En Fontevrault ne malproksime de Grésillon. Robert d'Arbrissel fondis ĝemeligitan abatejon, kies abatino devis esti ne virgulino kiel kutime, sed vidviniĝinta. Monaĥinejo estis promocia rimedo por virino : monaĥinoj scipovis legi. Ili verkis multfacetan literaturon : poemojn, medittekstojn, preĝojn, enciklopediajn kaj mistikajn verkojn, poredu-



kajn kaj historiajn (laŭ tiama koncepto) librojn. Ili korespondadis kun princoj kaj papoj. Brigitte el Svedio kaj Catherine el Sieno instigis la papon forlasi la urbon Avignon kaj reiri Romen. (Catherine scipovis legi sed ne skribi ; pro tio ŝi diktadis siajn korespondaĵojn).

Favora eklezia agado ankaŭ notindas sur geedziĝa kampo. Ĝi daŭre insistas pri la nepra neceso de interkonsento geedza por ke geedziĝo plenvalidu. Kristana familio fundamentas ne sur edza aŭtoritato sed sur geedziĝa sakramento. Tamen la kanonjuristoj estas obsedataj de la frazo de sankta Paŭlo eldirita : « Viro estas kapo de ino ».

Ni emfazu la iom mirigan por ni eklezian sintenon koncerne geedzecon : sangadulto, t.e. geedziĝo inter du parencoj ofte malproksimaj (komence ĝis la sepa parenceca grado) estis ripete kondamnita kaj severege punita ; dume surkampe de eksedziĝo oni estis tolerema kaj la t.n. sangadulto ofte fariĝis preteksto por eksedz (in) iĝo.

SOLVIRINOJ

Al ili oni rilatas diversmaniere.

— Por senhavaj junulinoj. senedzaj solulinoj fondiĝas beginejoj, specoj de malgrandaj komunumoj en privataj domoj situantaj, duon-monaĥinejoj duon-laborejoj, sub ia religia regateco. Tiaj establoj plejmulte disfloradis en Germanio kaj Flandrio (XIII-a kaj XIV-a jarcentoj). En la urbo Kolonjo oni kalkulis du milojn da ili.

— Prostitutinojn oni taksis ne forperditaj knabinoj sed misvojigitaj ŝafinoj. Ili estis rajtigitaj fondi korporacion kun privilegioj. Buleo datiĝanta de la jaro 1198 promesas plenan pekabsolvon al tiu, kiu edziĝas je stratulino. Tri religiaj ordenoj fondiĝas por ilin savi. Kiam oni ekkonstruis nian dipatrinan katedralon en Parizo ilia korporacio oferdonis altan monsumon por aĉeti ĉu vitralon, ĉu multekostan pokalon. Jen granda embaraso por la klerikoj !

Ni rimarku, ke la eklezio celas inan promocion sed ne ties emancipadon. Mezepoke klerikoj elmontradas enradikiĝintan antaŭjuĝon : virino estas de ili perceptata kiel tentantino, satana fiservantino, kiu delogas la monaĥojn. Pro tio la monaĥa regularo starigas nesupereblan baron inter monaĥoj kaj virinoj : servaj fratoj eĉ devas forpeli almozpetantinojn ĉeporde de monaĥejoj.

Apogante sin sur aristotela teoriumado sankta Tomaso demonstras inan malsuperecon : ĝi estas natura manko. Dum viro estis laŭplane kreata por plenumi racian agadon, virino estis kreata nur por naski. Kaj eksciu, ke mezepoke se virino spertis dumamoran ĝuon, eĉ kun la edzo, ŝi mortmerite pekis... Por malhelpi, ke la klerikaro amoru, oni prikonsilis ilin vigle bildigi al si inan internaĵan putriĝon.

Ĉi-okaze ni iom priparolu la « sorĉistinan demandon ». Sorĉado ofte konsistis el reciproka kunhelpado malkoncipa aŭ abortiga ; ankaŭ el sekreta kontraŭo al la ĉiopova klerikaro. Aliflanke kontraŭsorĉa ĉasado esprimis viran timon kontraŭ iaspeca mistera, neklarigebla virineco. Ĝi estis kvazaŭ memdefenda reflekso. Dum la XVI-a jarcento sorĉistinaj procesoj plinombriĝis : iu inkvizitoro bruligis 900 laŭdire sorĉistinojn kaj fieris pro tio...

Fakte kontraŭina sinteno plifirmiĝas dum la XIII-a kaj XIV-a jarcentoj. Laŭlonge de la 18 000 versoj, per kiuj Jean de Meung plilongigas la tiel nomatan « Roman de la Rose » de Guillaume de Lorris tute alietose komencita, li descendas virinon de alta ĉevalo sekve de profanaj argumentoj. Kiam burĝa konceptaro ekregas ina rolo estas malaltigita : nur por fariĝi monaĥino ŝi lernas skriboarton ; aliokaze nur per mastrumado kaj obeemo ŝi kontentiĝu. En Pollando dum la XIV-a jarcento junulino sin vire vestas por viziti la universitaton en Krakovo ; post du jaroj oni malkovras la ruzaĵon kaj ekskludas ŝin.

APERO DE VIRINISMO : CHRISTINE DE PISAN (1363-1431)

Ŝi senlace pledas por virina instrurajto. Ŝi enkondukas italan etoson transalpen kaj inaŭguras eraon de ina protestado. Ŝi naskiĝis en Venecio, vivis en Parizo en lukso kaj komforteco kaj tie ricevis zorgan edukon kaj instruon en libera etoso. Sed junaĝe ŝi preskaŭ samtempe perdas la patron, vidviniĝas kaj en soleco devas eduki siajn gefilojn kaj kontraŭbatali siajn kreditorojn. Ŝi estas la unua verkistino, kiu sin vivtenas per verkado, kiel kronikistino en burgundia kortego. Ŝi defendas inan kondiĉon, sed kadre de tradicio kaj religio ; ŝi ja ne estas malordigemulino. Ŝi nur petegas instrurajton por knabinoj same kiel por knaboj.

Renesanco naskiĝis surborde de Tibero kaj Arno riveroj, en svarmado de vivo kaj lumo ; ĝi disvastiĝas tra nebulajn landojn, kie ĝi estos sufokata de kontraŭa idearo. Liberon naskanta, renesanco leviĝas subsigne de platona filozofio kaj ina idealigo. Sed kie ĝi estiĝis, tie ĝi sinkos en dibocado kaj fivirina regado.

Naskanta kontraŭdirojn ĝi ekstarigas virinan emancipadon sed samtempe malliberigas

virinon. Ĝi malfermas antaŭ ŝi reĝan vojon de intelekta kulturo sed samtempe starigas racian mondon tipe viran, sciencan kaj teknikan. Ĝi forigas klerikan misoginecon per paganaj argumentoj, sed malmoligas la leĝaron per revalidigo de romia juro. En la momento, kiam la okcidentaj landoj kovriĝadas per katedraloj, en Italio disfloradas palacoj laŭ princa gusto elpensitaj. Gravas riĉaĵoj kaj ekstera pompo. Ino enfokusiĝas en kortega vivo, al kiu ŝi donas propran impulson kaj stampon. Ŝi malkrudigas, ekzaltas, alportas konversacian arton kaj vivarton sur afableco bazitan. En Francio kortega vivmaniero tia komenciĝas sub Anna el Bretonio. En Italio Medicis dinastio enscenigas la nobelulinon, la palacan damon : ĉiuspecajn artofakojn ŝi devas koni, studi muzikon kaj pentroarton, eĉ enpenetri tipe sciencajn konofakojn por esti kapabla eldiri personan opinion. Junaĝe edziniĝontaj, la knabinoj ricevas fruan, rapidigitan edukon. Nur dektrijarulino Mary Stuart eldiris unuan latinlingvan paroladon. Elizabeth reĝino ĉiutage dediĉis kelkajn minutojn al legado laŭoriginale de antikvula verko. Marguerite de Navarre, la fratino de Francisko la unua, prezentas tipan enkorpiĝon de tiu idealo. Akademio de Karlo la naŭa fondita malfermiĝas al virinoj.

Guillette Pernet el Liono : jen la unua burĝa verkistino, misfamigita same kiel Louise Labé, kiu verkas laŭ petrarka stilo kaj sentas al si same bone ĉu rajdante, ĉu versfarante, ĉu mastrumante (ŝiaj konfitaĵoj estis prilaŭdataj samgrade, kiel ŝiaj sonetoj). La t.n. « bela ŝnuristino », ina favorantino, tamen estas escepto kaj tia agado neniel ŝanĝas inan vivsorton. Kompreneble nur elito alproksimiĝas al mensaj scikonoj.

Sed lernejoj ekmalfermiĝas al knabinoj ; la ursulina ordeno fondiĝas cele al edukado knabina. En Germanio dum oni fermas monaĥinejojn, reformaciaj adeptoj malfermas lernejojn porknabinajn kaj en Strasbourg instruado fariĝas deviga por ambaŭseksuloj.

Ina beleco estas prikantata, kiel rebrilo de supera harmonio. Ino estas ekzorcizita el ĉiaspeca kompliceco kun inferaj potencoj. Plie : ne la naturo faris el ŝi neperfektan estaĵon, sed la socio sekve de siaj kutimoj. Sed en tiu idealisma ĥoro enmiksiĝas karna ekzaltiĝo. Oni neniel bridas voluptamon, eĉ ties troigon.

Renesanca periodo karakteriziĝas per kontraŭdiraĵa svarmado : ambaŭ reformacio kaj kontraŭreformacio restarigas geedzecan valoron. Virgeco ne plu estas virto unuaranga ; pastoroj edziĝas. Okaze de koncilio en Trente kontraŭreformacio emfazas la dignecon de la geedziĝa sakramento. Sed en Britio, Elizabeth reĝadas 45 jarojn, senedza.

Renesanco estas fermita universo. Civilizacio translokiĝas de la Sudo norden. Sude oni vivas ekstere ; norde, ene. Reformacio kontraŭante diboĉon prilaŭdegas honestan familivivon. Lutero pentras idealan portreton de virino piema, respektoplena al Dio. Ŝi ŝatas uzi siajn manojn por hejme perlabori sian panon ; ŝi similas varŝipon, kiu alveturigas komercaĵojn de malproksime. Laŭ Kalvino, viro ĉe oficejo, virino ĉe hejmoforno : jen tia devas esti burĝa vivregulo. Oni malpezigas virinajn instruprogramojn, forigas el ili la latinan, kiel signon pri vireca aŭ papeca kulturo. Nur unu libro indas : la Biblio.

En Britio kreiĝas viraj kluboj, parte pro rigidmoreco de hejma vivmaniero, parte pro ina neklereco. En Hispanio oni almetas stangetojn ĉe fenestroj ; en Venecio, urbo duon-orienta duon-germana, oni enklostrigas la junulinojn ; kaj ankoraŭ pli rigidmora estas la sicilia vivmaniero pro kunestado de normanda juro kaj hispana influo.

Kelkaj metioj fariĝas malpermesataj : kune kun industriigo en Anglujo malaperas panfarado, bierfarado, laktopreparado. En teksindustrio nur malaltrangaj taskoj postrestas. En silklaboro virinoj jam ne okupiĝas pri teksado de larĝaj ŝtofovolvaĵoj sed pri ruband- kaj puntofarado.

En Francio komence de la XVII-a jarcento troveblas nur tri korporacioj : la tukkudristinoj, la bukedfaristinoj, la lin- kaj kanablaboristinoj. En Nederlando depost la jaro 1492-a estas malpermesite al virinoj komerci krom pri drapaĵoj : ankaŭ esti gastejestrinoj. Laŭ jura vidpunkto virino kundividas la sorton de neplenaĝulino. Nur unu juran akton ŝi kapablas : testamenti.

En monaĥinejoj oni restarigas enan vivmanieron ; tamen sankta Francisko el Sales fondas la vizitacian ordenon, kie monaĥinoj sin dediĉas al eksterdomaj taskoj : viziti la malsanulojn kaj malriĉulojn. Sed tia monaĥinejo estas fondita en sendependa provinco Savojo. Iom poste la episkopo en Liono malpermesas la fondiĝon de simila establo kaj kelkajn jarojn pli poste la monaĥinoj devas ŝanĝi sian regularon kaj alpreni enklostrigitan vivmanieron.

Tiutempe perlibra civilizacio malfermas por virinoj introspektan universon. Montaigne, multe pli tolerema ol Rablezo aŭ Erasmo, konsentas, ke virinoj aliru mensan kulturon, legu ne nur la Biblion, sed pri filozofio, historio, poezio, kvankam ilia aparta rolo konsistas el prudenta hejmprizorgado. Li flegas privilegiajn rilatojn kun nebela nobelulino, Marie de Gournay, kvazaŭ lamspirita idino, kiu entuziasmiĝis pri liaj Eseoj. Kaj sur tiu nerekta, zigzaga evolulinio ŝi fariĝas la unua ĉenero el la feministularo deksepjarcenta.

S. BONIOL.

FRUKTOJ DE LA SPACO

REVOLUCIAJ MATERIALOJ

Laŭ eminenta specialisto la perfektigado de novaj materialoj, cele al spaca esplorado, estas la plej granda progreso farita dum la 3 000 lastaj jaroj de nia erao. Lia entuziasmo ne ŝajnas ekcesa, ĉar tiuj novaj materialoj lasas jam esperi ekonomikajn konsekvencojn plej gravajn ; ĝis ĵusa periodo, inter la 90 elementoj konataj, nur unu dudeko estis kemiaj kuriozaĵoj kaj nur kelkaj el ili estis konsiderataj kiel metaloj ; ĉiuj bazaj elementoj uzataj en la unua duono de nia jarcento : ŝtalo, ne ferozaj metaloj, vitro, betono, ligno, ceramiko, ekzistis jam antaŭ 4-5 mil jaroj. Nur kaŭĉuko kaj aluminio estis industriaj novaĵoj antaŭ apero de plastoj (tiuj ĉi lastaj rezultis de freŝdata malkovro de radiadoj). Hodiaŭ preskaŭ ĉiuj elementoj — krom gasoj — estas diversmaniere uzataj pro siaj metalaj kvalitoj.

Titano, germaniumo, silicio, zirkonio :

Ili jam ekzistis en la Naturo ; porspaca ellaborado valorigis tiujn jam ekzistantajn materialojn : oni igis ilin rezistantaj al fortaj temperaturoj, al fortaj premoj kaj al radiadoj.

Titano : post laminatado, forĝado, kunmetado, estas leĝera, solida kaj kapabla rezisti al fortaj temperaturoj kaj taŭga por aviadiloj kaj novaj spacaj veseloj.


Germaniumo kaj silicio : estas la ĉefaj materialoj por spaca elektroniko.

Zirkonio : trovas ĉefan rolon en ellaborado de motoroj por la nukleaj fuzeoj, kiuj transportos homojn al Marso kaj al aliaj planedoj.

Tiuj kvar korpoj estas pli kaj pli uzataj por fabriki bazajn industriajn materialojn.

Novaj metalaj alojoj : ultra sentivaj kaj ekstreme maldikaj, tiaj estas la magnetaj ŝtaloj kaj titano-folioj, kies dikeco estas 1,5 mikrono (= 1,5 milono da milimetro) uzataj en satelitoj por detektado de partikuloj.

La bezono por spaca esplorado de novaj materialoj postulis perfektigadon de la tekniko necesa por ilin produkti. Eĉ en la uzinoj por preciza mekaniko oni ne trovis la necesan ekipaĵon. Nur horloĝ-fabrikado plej multe alproksimiĝas al tiu speciala tekniko. Tial, en Pensilvanio « Hamilton Watch Co » en sia sekcio de preciza metalurgio plej taŭgis, industri-grade, per foto-kemiaj procedoj, por ellaborado de tre



maldikaj metaloj. En tiu giganta uzino — sen polvo, kun purigita aero kaj kontrolita humideco — oni traktas pli ol 60 metalojn purajn aŭ alojitajn, inter kiuj kelkaj estas ĝiaj propraj inventaĵoj ; kompreneble tiuj novaj instalaĵoj altiras atenton de ĉiuj : tiun de komputero-fabrikantoj, kiel tiun de aŭtomobiloj-konstruantoj.

La spacaj kapsuloj estas biologie sterilaj. Ilia muntado postulas rigoran purecon, same kiel en la operacio-ĉambro de hospitalo kaj en la nova elektronika industrio. La plej eta polvero, videbla nur pere de mikroskopo povas malpliigi la efikecon de la delikataj instrumentoj uzataj en la moderna elektronika tekniko kaj precipe en telekomunikadoj. Oni volas nepre garantii sekurecon kaj daŭron de tiuj ultra-sentivaj aparatoj. La teknikistoj devas surmeti kombinaĵojn faritajn el sintezaj teksaĵoj perfekte glataj. Plue oni ĵus uzis aer-kurtenon por protekti la spacajn kapsulojn dum ilia konstruo. Tiu aer-kurteno estas ankaŭ uzata dum provoj faritaj sur antibiotikoj ; ĝi izolas ilin kontraŭ polvoj eble portantaj ĝermojn aŭ mikro-organismojn.

Pli ol la materialoj mem gravas la ideo, ke inĝeniero povas ion ajn krei, zorgante nur pri funkcio kaj formo. Li petos de la fabrikantoj la bezonatan materialon ; tiuj ĉi elektos en la larĝa gamo da naturaj elementoj tiujn, kiuj kondukos al materialoj kun precizaj kvalitoj kaj por preciza celo. Pli kaj pli ili uzos iujn mikro-strukturojn el atomoj aŭ molekulojn por produkti malsimplajn korpojn, kiuj donos la novajn materialojn, kiuj, dank'al precizaj kombinadoj siaflanke donos novajn alojojn.

KONSTRUO-MATERIALOJ

Jen **Komponaĵo** konstituita el malgrandegaj fibroj el boro-kristaloj ĉirkaŭvolvitaj en plasta rezino ; dufoje pli solida kaj rezistanta ol aluminio ĝi estas multe pli malpeza kaj multe pli malmultekosta ; ĝi utilas por konstrui domojn kaj veturilojn.

Jen **travideblaj materialoj** el silikono, etileno-propileno, izopreno kaj poliuretano, sufiĉe rezistantaj al longa uzo en la Spaco kaj sufiĉe flekseblaj por esti falditaj ; ili estas uzataj, kiam la strukturo devas fronti diferencon inter interna kaj ekstera premoj ; En Svisujo, Societo Contraves kreis « sandviĉon-materialon » el ekspansiita plasta spongo, tiel rigida kiel ŝtalo kaj uzata por fabriki domo-murojn kaj skiojn plej leĝerajn kaj solidajn.

Jen **plasta mortero** el vitraj fibroj uzata en USONO por fabriki tubaron por akvo (drenado, irigacio, kloakoj) : leĝera, rezistanta, ne koroda, nerompebla, ĝi plue estas malmultekosta.

Jen **aluminigita plastaĵo** : ĝia dikeco estas 1/800 de cm. ; unue uzata kiel super-izolilo ĉar ĝiaj varmeco-ecoj estas unikaj ; plie ĝi estas supla, akv-imuna kaj tute ŝirmas kontraŭ vento. Hodiaŭ oni trovas ĝin en magazenoj sub formo de koverto aŭ vesto facile faldeblaj, kaj kiujn oni povas teni en mano aŭ meti en poŝon ; ĝi plej taŭgas por alpinistoj.

Jen **la revolucia « abel-nesto »** (3-D) : tridimensie teksita ĝi estis unue uzata por la botoj de la astronaŭtoj ; ĝi konstituas la termikajn ŝildojn, kiuj protektas la nazon de Apolo-fuzeoj dum ilia enirado en teran atmosferon. Ili utilas por konstrui spacajn radar-staciojn, izotermajn veturilojn, frostujojn, ferdekojn, sport-aŭtomobilojn, protektantajn ekranojn en uzinoj, kie oni bezonas fajregojn plej intensajn, domo-murojn en tropikaj landoj kaj en Alaska.

Jen **nova familio ĉe la « Kopolimeroj »** : ili kapablas rezisti al temperaturoj 340° C. Plisolidigitaj pere de vitro kaj lamenigitaj, ili estas pli solidaj ol la aluminio ĝis nun uzata ĉe aviadiloj ; ili favore anstataŭos neoksideblan ŝtalon kaj titano-alojojn ; kiel adheraĵoj ili permesas gluaĵadojn rezistantajn al premoj je 80 Kg po cm2.

Tiu revolucio ĉe materialoj permesos al iu ajn lando ne plu bezoni la naturajn elementojn. De nun Scienco alportos ĉie ajn la bezonajn materialojn kreitajn el iu ajn natura fonto.

Oni povas antaŭvidi tutan ŝanĝon en la industriaj sektoroj kaj plej ĉefe gravajn modifojn en la ekonomikaj rilatoj inter landoj plej evoluintaj kaj landoj ne-evoluintaj.

S. GUILLOT.

LA TRI SENKANTAJ MESOJ

KRISTNASKA RAKONTO

de Alphonse DAUDET (Alfons DODE)

— Du trufitaj meleagroj. Garrigou ? (garigu).

— Jes, Reverendo, du meleagroj belegaj, ŝtopitaj per trufoj. Mi estas kredinda, ĉar mi helpis por plenigi ilin. Oni preskaŭ timis, ke ilia haŭto disŝiriĝos, tiel ŝtreĉita ĝi estis.

— Jesu-Maria ! Mi tiel arde ŝatas trufojn ! Rapidu, pasigu mian surplison, Garrigou. Kaj krom la meleagroj, kion plian vi vidis en la kuirejo ?

— Ho ! Ĉiuspecajn bongustaĵojn ! Ekde tagmeze, ni nur senplumigis fazanojn, upupojn, tetraojn kaj tetrojn. Ĉien disflugis la plumoj. Poste, de l'lageto, oni alportis angilojn, orkolorajn karpojn, trutojn ktp...

— Kiel dikaj estis la trutoj, Garrigou ?

— Dikegaj... tiaj ! Reverendo. Enormaj...

Ho ! Dio, ŝajnas al mi, ke mi jam vidas ilin. Ĉu vi plenigis la buretojn ?


— Jes, Reverendo, mi metis la vinon en la buretojn, sed certe ĝi ne egalos tiun, kiun vi trinkos post la noktomeza meso. Se vi povus vidi tion en la manĝoĉambro de la kastelo, ĉi ĉiujn karafojn, kiuj brilegas, plenaj je ĉiukoloraj vinoj... Kaj la arĝentan teleraron, la ĉizitajn surtablaĵojn, la florojn, la kandelingojn. Neniam antaŭe, oni vidis tiaspecan noktofestenon ! Lia markiza Moŝto invitis ĉiujn Nobelsinjorojn ĉirkaŭajn. Vi nombros almenaŭ kvardek, krom la juĝisto kaj la notario... Ha !... Vi estas ja, tre bonŝanca, Reverendo, ke vi partoprenos !... La nura flarado de la meleagroj, rezultas, ke la odoro de la trufoj sekvas min ĉien !

— Nu, nu, filo ! Ni atentu ne peki pro tromanĝemo precipe dum Kristnaska Nokto. Rapidu, ekbruligu la kandelojn, kaj sonorigu la unuan alvokon por la meso ; ĉar alproksimiĝas noktomeze kaj necesas ne prokrasti...

Tia babilado okazis iun Kristnaskan nokton de l'dibɜnita jaro mil sescent kaj aliaj inter la Reverendo Dom Balaguère (dom balager) iama prioro de la monakoj de Sankta Barnabo, nun salajrata kapelestro de la Nobelsinjoroj de Trinquelage kaj lia akolito Garrigou aŭ tiu, kiun li opiniis esti la akolito Garrigou, ĉar vi devas scii, ke ĉi nokte, la diablo surprenis la rondan vizaĝon kaj neprecizajn trajtojn de la juna sakristiano por pli bone tenti la respektindan Patron kaj instigi lin terure peki pro tromanĝemo. Do dum la supozata Garrigou tutbrake kariljonis je la sonoriloj de la sinjora kapelo, la Reverendo surmetis sian kazublon en la eta sakristio de la kastelo ; kaj kun sia spirito jam nebula pro ĉiuj gastronomiaj priskriboj, li ripetis al si mem dum li sin vestis :

— Rostitaj meleagroj, orkoloraj karpoj, trutoj enormaj !

Ekstere, la nokta vento blovadis, dissendante la muzikon de la sonoriloj, kaj lumigiloj aperis el la ombro sur la deklivoj de la monteto Ventoux (vantu)., ĉe kies supro staris la malnovaj turoj de Trinquelage. Tio estis familioj de farmistoj, kiuj alpaŝis al la nokta meso en



la kastelo. ili grimpis la deklivon, kvin- aŭ sesope kantante kun la patro antaŭe portanta lanternon enmane ; la virinoj envolviĝis en siaj grandaj senmanikaj brunaj manteloj, en kiuj la infanoj trovis ŝirmejon. Malgraŭ la horo kaj la maivarmo, tiuj bonaj homoj iris ĝoje, kuraĝigataj de la penso ke, ĉe la fino de la meso, ili trovos, kiel kutime, manĝon preparitan por ili mem en la kuirejoj de la kastelo. De temp'al tempo, sur la peniga deklivo, la karoso de iu Nobelsinjoro antaŭata la torĉoportantoj, briligis siajn vitraĵojn sub la lunlumo aú mulino trotadis svingante siajn tintilojn, kaj dank'al la lumeto de la lanternoj, ĉirkaŭataj de nebuleto, la kamparanoj rekonis sian juĝiston kaj lin salutis pasante :

— Bonan, bonegan vesperon, Majstro Arnoton !

— Bonan, bonegan vesperon, karaj !

La nokto estis hela, la stelojn vigligis malvarmo ; la bizo pitris ; kaj tre eta grajlo, kiu glitis sur la vestoj, ne malsekigante ilin fidele konservis la tradicion de la neĝoblankaj Kristnaskaj festoj. Tute ĉe la supro de la deklivo, la kastelo aperis kiel la unika celo, kun sia impona maso da turoj, pinjonoj ; la sonorilturo alte staris en nigre blua ĉielo kaj amaseto da lumetoj iris, venis, svingiĝis ĉe ĉiuj fenestroj kaj similis, sur la malhela fono de la konstruaĵo, al la fajreroj kurantaj en la cindroj de ĵus bruligitaj paperoj. Post la levponto kaj poterno, por atingi la kapelon, necesis trairi la unuan korton plenan je karosoj, lakeoj, portoseĝoj ; kaj tute helan pro la flamoj de la torĉoj kaj la kuirejaj fajroj. Oni aŭdis la tintadon de la rostilturniloj, la bruegon de la kaseroloj, la kunpuŝiĝon de la kristaloj kaj arĝenta manĝilaro, prepare al la manĝo ; super ĉio, tepida vaporo bonodorigis la rostitajn viandojn kaj la maldolĉaj herboj de la komplikaj saŭcoj pensigis la kampulojn same kiel la kapelanon, kaj la juĝiston, kaj ĉiujn :

— Kiel bongusta noktomanĝo, post la meso...

Drin, drin, drin !... Drin, drin, drin !... La noktomeza meso komenciĝas. En la kapelo de la kastelo, miniatura katedralo kun interkrucigitaj arkaĵoj, kaj kverkaj lignaĵoj, tiel altaj kiel la muroj, la tapetoj estas freŝe etenditaj

kaj ĉiuj kandeloj donas sian lumon. Kiom da homoj, kiom da tualetoj ! Unue, sidante en la sidfakoj ĉirkaŭ la korusejo, la Nobelsinjoro de Trinquelage en sia vesto de salmokolora tafto kaj apud li, ĉiuj nobeluloj invititaj. Vidalvide, sur velurgarnitaj preĝoseĝoj sidiĝis la maljuna markizino vidva en sia robo de fajrokolora brokaĵo kaj la juna Sinjorino de Trinquelage kronita per alta turo el gladita punto laŭ la plej freŝa modo ĉe la franca kortego reĝa. Pli malsupre, estas rekoneblaj nigre vestitaj kaj zorge razitaj, kun grandaj perukoj la juĝisto, Majstro Arnoton kaj la notario, Majstro Ambroy (ambrŭa), ambaŭ seriozaj makuloj inter la buntaj silkoj kaj la spindelaj damaskoj. Poste, enviciĝis la dikaj ĉefservistoj, paĝioj, ĉashelpantoj, intendantoj, Sinjorino Barbe (barb) kun sia ŝlosilaro flanke pendanta ĉe fajnarĝentaĵo. Funde, sur la benkoj, troviĝas la etranguloj, servistinoj, farmistoj, kun siaj familioj ; fine, plej fore, kontraŭ la pordego, kiun ili senbrue movas, sinjoroj marmituloj, kiuj, inter du saŭcoj, venas enspiri iom da mesaero kaj alporti odoron de festeno en la preĝejon festantan kaj tepidan pro la kvanto da brulantaj kandeloj.

Kio senatentigas la mesfaranton ? Ĉu la vidado de tiom da blankaj kaj buntaj vestaĵoj ? Ĉu ne, prefere, la sonorileto de Garrigou, tiu diabla sonorileto, kiu svingiĝas ĉe la piedo de l'altaro kun infera hasto kaj laŭŝajne senhalte ripetas :

— Ni rapidu ! Ni rapidegu ! Ju pli frue ni finos, des pli frue ni ĉetabliĝos !

Estas vere, ke ĉiufoje, kiam tintas tiu diabla bruilo, la kapelano forgesas sian meson kaj pensas nur pri la noktofesteno. Li imagas la kuiristojn, la fornojn, kie ardas fandkapabla fajro, la vaporon, kiu ŝvebas supre el la kovriloj duonfermitaj kaj en tiu vaporo du mirinde belaj meleagroj ŝtopitaj per trufoj.

Aŭ li vidas vicojn da paĝioj, portantaj pladojn envolvitajn en allogaj vaporoj, kaj kun ili, li eniras en la ĉambregon jam pretan por la festeno. Ha ! Delicoj ! Jen la vasta tablo tute plena kaj disradianta, la pavoj ankoraŭ vestitaj je siaj plumoj, la fazanoj disetendantaj siajn orbrunajn flugilojn, la rubenkoloraj boteletoj, la piramidoj da belegaj fruktoj, inter la verdaj branĉoj kaj tiuj mirigaj fiŝoj pri kiuj parolis Garrigou, kuŝantaj sur tavoloj da fenkolo kun perlamota skvamo kvazaŭ ili ĵus venus el la akvo, kun bukedo da odorantaj herboj en iliaj naztruoj. Tiel potenca estas la vidado de tiaj mirindajoj ke ŝajnas al Dom Balaguère, ke tiuj belegaj pladoj kuŝas tie, antaŭ li, sur la brodaĵoj de la altartuko kaj du aŭ trifoje, anstataŭ « Dominus vobiscum » (la Sinjoro estu kun vi) li surprizas sin recitante « Benedicite » (benu !). Ekster tiuj negravaj eraretoj, la respektinda viro progresigas sian diservon tre konscience, sen forgesi unu linion, sen forigi unu genuflekson, kaj ĉio disvolviĝas sufiĉe kontentige ĝis la fino de l'unua meso ; ĉar vi scias, ke en la tago Kristnasko la sacerdotoj devas celebri tri sinsekvajn mesojn.

— Jen ! For l'unua ! diras al si mem la kapelano kun kontenteca suspiro ; kaj sen malŝpari unu minuton, li mansignas al sia akolito aŭ al tiu kiun li opinias sia akolito kaj :

Drin, drin, drin... Drin, drin, drin !...

La dua meso komenciĝas kaj samtempe, komenciĝas la peko de Dom Balaguère.

— Haste ! Hastege ! Ni rapidu ! krias per sia akreta voĉo la sonorileto de Garrigou kaj ĉi foje, la kompatinda celebranto, tute donante sin al la demono de tromanĝemo, impetas sur la meslibro kaj voras la paĝojn per la avideco de sia superekscitita apetito. Li furioze genufleksas, leviĝas, nur skizas la krucsignojn, mallongigas ĉiujn gestojn por pli frue atingi la finon. Ĉe l'Evangelio, li apenaŭ etendas siajn brakojn, frapas sian bruston ĉe la Confiteor (mi konfesas miajn pekojn). Inter la akolito kaj li, estas vetrapida fuŝprononco. Versetoj kaj responsorioj interpusiĝas. La vortoj, duonprononcataj per preskaŭ fermita buŝo por ŝpari tempon finiĝas en nekompreneblaj flustraĵoj :

Oremus (ni preĝu)... ps... ps...

Mea culpa (mia kulpo)... pa... pa...

Same kiel urĝemaj vinberrikoltistoj, kiuj premas la berojn en la kuvo, ambaŭ baraktas en la meslatino, dissendante ŝprucaĵojn al ĉiuj direktoj.

Dom... scum diras Balaguère.

...stutuo ! respondas Garrigou.

kaj ripetfoje, la malbeninda sonorileto estas tie por kril ĉe iliaj oreloj, kiel tiuj tintiloj, kiujn oni almetas al la diliĝencaj ĉevaloj por fulmorapide kurigi ilin. Imagu ! Laŭ tiuj kondiĉoj, senkanta meso estas rapide for !

— Jen ! For la dua ! pensas la kapelano, tute senspira ; kaj ne prenante unu minuton por enspiri, ruĝvizaĝa, ŝvitanta, li preskaŭ saltas la ŝtupojn de l'altaro kaj.

Drin, drin, drin... Drin, drin, drin !

Nun li komencas la trian meson. Nun nur kelkaj paŝoj apartigas lin de la manĝoĉambro, sed, ve ! laŭmezure kiel la festentempo alproksimiĝas, la malbonŝanca Balaguère konscias pli kaj pli pri furiozo de senpacienco kaj voremo. Lia vizio pliintensiĝas ; jen la orkoloraj karpoj, la rostitaj meleagroj. Li tuŝas ilin, li... Ho ! Dio ! La pladoj ellasas vaporon, la vinoj bonodoras kaj per sia tintado, la sonorileto krias :

— Rapide, rapide, ankoraŭ pli rapide !

Sed, kiamaniere pli rapidi ? Liaj lipoj apenaŭ moviĝas. Li ne plu prononcas la vortojn. Escepte se li trompus Dion kaj artifike finus la meson. Kaj tion, li faras, kompatinda ! Laŭ sinsekvaj tentoj, li unue supersaltas verseton, poste du aliajn. Nun tro longa estas la epistolo, li ne legas ĝin ĝisfine kaj ekvortigas la Evangelion, vidas la Credo (mi kredas) sed ne haltas, forigas la Pater (Patro), de malproksime salutas la Prefacon (mesparto) kaj per kuradoj kaj saltoj, sin ĵetas en la eternan damnadon, daŭre sekvata de la fia Garrigou, kiu mirige konkorde lin helpas, levas la kazublon, turnas duope la paĝojn de la meslibro, kolizias kun la pupitroj faligas la buretojn kaj senhalte skuas la sonorileton pli kaj pli laŭte, pli kaj pli rapide.

Estas vidindaj la mirfrapitaj mienoj de ĉiuj ĉeestantoj. Ili devas sekvi laŭ la gestoj de la sacerdoto, tiun meson, kies eĉ unu vorton ili ne povas aŭdi ; unuj ekstaras kiam la aliaj surgenuiĝas, aŭ sidiĝas kiam la aliaj ekstaras : kaj ĉiuj fazoj de tiu stranga diservo konfuziĝas sur la benkoj en mil diversaj sintenoj. La Kristnaska stelo, tie sur la ĉielvojoj, irante al la eta bovejo paliĝas pro teruro, vidante tian konfuzegon.

— La patro tro rapidas. Oni ne povas sekvi, flustretas la maljuna Nobelsinjorino, svingante sian kufon, senatente.

Majstro Arnoton, kun siaj rondaj ŝtalaj okulvitroj surnaze serĉas en sia meslibro, en kiu momento de la diservo oni troviĝas. Sed tre sincere, ĉi ĉiuj bonaj homoj, kiuj ankaŭ pensas pri festeno, ne plendas, ke la meso antaŭeniras tiel rapide ; kaj kiam Dom Balaguère, kun distradianta vizaĝo, sin turnas al la fideluloj kaj plengorĝe anoncas : Ite, missa est (iru for, la meso estas finita) nur unu voĉo en la kapelo respondas : « Deo gratias » (ni dankas Dion) tiel ĝojplene, tiel vigle, ke oni preskaŭ opinius, ke ĉiuj jam ĉetabliĝis por l'unua tosto de l'festeno.

Kvin minutojn poste, la amaso de la Nobelsinjoroj sidiĝis en la vasta ĉefĉambro, kun la kapelano inter si. La kastelo, iluminita de pinto ĝis bazo, tondris je krioj, kantoj, ridadoj kaj babiladoj kaj la respektinda Dom Balaguère plantis sian forkon en flugilon de tetrao, dronigante siajn konsciencriproĉojn en inundo de vinoj de l'papa vitejo kaj de bona viandsuko. Li drinkis kaj voris tiagrade, ke tiu kompatinda sankta homo mortis en la nokto mem pro terura atako, netrovinte tempon por pentofari ; tiun matenon mem, li alvenis en la ĉielon, ankoraŭ tute konfuzega pro la lastnoktaj festoj, kaj mi invitas vin imagi kian akcepton li tie trovis.

— For de miaj okuloj, vi, malbona kristano, diris al li la plej alta juĝisto, nia komuna majstro. Via peko sufiĉas por elkompensi vian virtoplenan vivon !... Ha ! Vi trompis min je unu nokta meso. Nu, anstataŭe ; vi celebros tri cent aliajn kaj vi envenos en la paradizon nur kiam vi farintos tiujn tri cent mesojn en ĉeesto de ĉiuj, kiuj pekis kun vi kaj pro vi !

Jen nun la vera legendo pri Dom Balaguère tia, kian oni ĝin rakontas en la regiono de la olivarboj. Nuntempe la kastelo de Trinquelage ne plu ekzistas, sed la kapelo ankoraŭ fiere staras ĉe l'supro de l'monto Ventoux (vantu). meze de grupo da kverkoj. La vento movas ĝian malfirman pordon, la herboj baras la sojlon ; estas nestoj en la anguloj de la altaro kaj en la embrazuro de la altaj fenestroj, kies buntaj vitraloj de longe malaperis. Tamen laŭdire, ĉiujare, je Kristnasko supernatura lumo vagas inter tiuj ruinoj kaj survoje al la mesoj kaj noktofestenoj, la kamparanoj vidas tiun fantoman kapelon lumigatan de nevideblaj kandeloj, kiuj brulas subĉiele, subneĝe kaj subvente. Vi priridos tion se vi ŝatos : sed iu tiea kultivisto nomita Garrigue, (garig) supozeble posteulo de Garrigou, asertis al mi, ke, iun Kristnaskan vesperon, post troa drinkado, li devojiĝis en la montaro direkte al Trinquelage ; kaj jen tio, kion li vidis : ĝis la dudek-tria, nenion ; ĉio silentis kaj montris nenian vivsignon. Subite, ĉirkaŭ noktomeze, kariljono sonoris ĉe l'Supro de la turo, malnova, tre malnova kariljono, kiun oni supozus dek leŭgojn for. Baldaŭ sur la supreniriga vojo, Garrigue vidis fajretojn tremeti kaj neprecizajn ombrojn agitiĝi. Sub la pordarkaĵo de la kapelo, paŝoj kaj flustraĵoj.

— Bonan Vesperon, Majstro Arnoton !

— Bonan, bonan vesperon, karaj !

Kiam ĉiuj finis eniri, mia vitkultivisto, kiu estis tre kuraĝa, alproksimiĝis senbrue kaj tra la fendoj de la disrompita pordo li vidis strangan spektaklon. Ĉiuj homoj, kiujn li renkontis survoje sidis en vicoj ĉirkaŭ la korusejo en la ruiniĝinta navo, kvazaŭ la iamaj benkoj ankoraŭ ekzistus. Belaj virinoj, vestitaj per brokaĵoj kun puntaj kufoj, Nobelsinjoroj pasamentitaj de kapo ĝis piedo, kamparanoj kun florornamitaj jakoj similaj al tiuj de niaj avoj, ĉiuj aspektis maljunaj, velkaj, polvokovritaj, lacaj. De temp'al tempo noktobirdoj, kutimaj gastoj de la kapelo, vekitaj de ĉi ĉiuj lumoj, vagis ĉirkaŭ la kandeloj, kies flamoj staris rekte kaj nebule, kvazaŭ ili estus malantaŭ gazo. kaj Garrigue multe amuziĝis pro iu ĉeestanto kun grandaj ŝtalaj okulvitroj, kiu, ĉiumomente, skuis sian altan nigran perukon, sur kiu unu el la birdoj staris implikite kaj movante siajn flugilojn. senbrue.

En la fundo, maljunulo ne pli alta ol infano surgenue meze de la korusejo, senespere svingis sonorileton sen tintiloj kaj sen voĉo, dum iu sacerdoto ore vestita, iris kaj revenis antaŭ la altaro recitante preĝojn tute neaŭdeblajn... Sendube, estis Dom Balaguère celebranta sian trian senkantan meson.

Elfrancigis A. RIBOT.

NOTOJ KAJ KLARIGOJ

BURETOJ : Boteletoj en kiuj oni preparas la vinon kaj la akvon por la celebrado de la meso.

DAUDET (dode) Alphonse (alfons) : Franca novelisto dramaŭtoro, naskita en Nîmes (1840-1897). El liaj verkoj, TARTARIN DE TARASCON estas tradukita al Esperanto.

DOM : Mallongigo de la latina « Dominus » : Mastro, kiu antaŭas la nomon de kelkaj religiuloj en difinitaj ordenoj.

KAZUBLO : Pli malpli riĉe ornamita vestaĵo, kiun la sacerdoto surmetas por celebri la meson (ne plu uzata nun en multaj lokoj).

REVERENDO : Neologismo kun la signifo : Respektindulo, uzata en la romkatolika Eklezio por alparoli iajn monakojn.

SURPLISO : Blanka vestaĵo uzita de la sacerdotoj ĝis la Koncilio Vatikano IIa por la ceremonioj.

POR VIA DISTRO


SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO :

Krucvortoj :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1	S	E	N	K	R	E	D	I	T	I	G	I
2	E	G	A	L	A	N	I	M	A	■	U	D
3	N	O	V	A	J	■	A	E	R	U	M	I
4	S	P	O	N	T	A	N	■	T	R	O	O
5	O	O	■	■	I	K	T	E	R	O	■	T
6	I	D	E	O	G	R	A	M	A	■	B	■
7	F	I	K	C	I	A	■	A	C	E	R	B
8	I	O	■	E	L	■	O	N	I	D	I	R
9	G	■	A	L	O	■	N	U	D	■	L	O
10	A	R	K	O	■	I	T	E	■	P	I	K
11	Ĵ	A	R	T	E	L	■	L	U	I	G	A
12	O	L	E	O	D	O	N	A	■	N	I	T

NOVAJ PROBLEMOJ :

Plenigu la ĉi-suban triangulon laŭ la tri postaj aroj da difinoj. Tiuj difinoj validas por vortoj horizontale kaj vertikale.



1a aro da difinoj :

1) Paroli per komunikiga aparato.
2) Mallongdaŭra.
3) Altranga ekleziulo.
4) Inklinado.
5) Embrio de mamulo.
6) Valora metalo.
7) Kemia simbolo de natrio.
8) Finaĵo de infinitivo.

2a aro da difinoj :

1) Libroforma listo de aĉeteblaj libroj.
2) Seksa amado.
3) Speco de hakilo.
4) Delikata odoro.
5) Granda speco de mevo.
6) Lirika poemo.
7) Japana aŭ ĉina ludo.
8) Finaĵo.

3a aro da difinoj :

1) Sendependeco.
2) Eŭropa respubliko duoninsula.
3) Ĉirkaŭ korta palisaro.
4) Eminentularo.
5) Longa rulebla objekto.
6) Ĉambro, loko.
7) Centra oficejo.
8) Finaĵo.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

◆◆◆◆

Pri la artikolo

Oni uzas ĝin, kiam la persono (aŭ la objekto) estas jam konata.

— la patro de la edzino.

RIMARKO : neniam LA antaŭ propraj nomoj — nek antaŭ : Ambaŭ, ĉiuj, kies.

Por esprimi ĝeneralan sencon, oni diras :

— donu al mi akvon por trinki.

— unu vidvino havis du filinojn (tamen nur **unu** personon).

IU-IA- certa-kelka montras aferon nedifinitan :

— oni atendas iun sinjoron- iaj strangaj sonoj ĝemas.

— en certaj okazoj, mi agus alie — kelkaj personoj kredis tion.

Libertempa distraĵo por ĉiuj :



Vidu kaj vidu kaj vidu kiel beletaj ili estas ! Ja, ankaŭ vi, antaŭ ol foriri al via feria restadejo, ne forgesis la tutan kolekton de viaj fotoj : infanoj, gepatroj, amikoj... Kiom ĝojaj estas viaj novkonatoj !

Ĉiam kun rideto !



Ja vi konas la sekreton de tiu dinamika direktoro de esperantista kulturdomo, kiu scias kombini laboron kaj sporton.

Rekordo :



Feliĉe, ke ni havis la ĵurnalistojn ! Aŭskultu tion, kion ili skribis : « Estas la plej spektinda akcidento, kiu okazis sur aŭtovojo, dum la dek lastaj jaroj ! » ĉu vi klare prezentas al vi tiun grandfaron ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KAS SEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brŭcke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (850 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (10 600 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoons traat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (22 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSO VIO (12 us. dol.).

Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj lan doj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1982, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le froid et la grisaille d'hiver ont fait place au soleil et à la douceur du printemps. Peut être est-ce pour cela que cet « Entre Nous » sera moins mélancolique que les précédents. Même s'il ne rend pas plus proches les solutions, le soleil donne aux problèmes, en les traversant, une certaine transparence qui les rend plus légers, plus supportables. La fleur qui s'ouvre, la feuille qui grandit nous rattachent au présent optimiste, à l'avenir proche.

L'avenir proche, ce sont les stages du printemps et de l'été. La rencontre internationale d'enfants va sans doute remplir le château et cette année se fait jour un phénomène qui risque de modifier les données habituelles. Les Français seront encore probablement les plus nombreux mais un groupe allemand s'annonce avec 35 participants dont 28 enfants. C'est un succès qui risque de limiter la participation des autres pays car le château n'est pas extensible et la température ne permet pas encore à cette saison l'utilisation des logements des communs... Les périodes d'été se présentent bien et les quelques difficultés d'encadrement semblent se résorber. Le week-end du 28-29 août sera consacré à la « Kultura semajnfino esperantista » organisée par Literatura Foiro-Koop. Il est trop tôt pour dire ce que sera cette fin de semaine dédiée à l'enseignement de la langue à divers niveaux mais les personnes interessées peuvent déjà nous écrire.

L'avenir proche c'est aussi les travaux d'entretien et d'amélioration. Nous allons pouvoir dans ce domaine faire plus que nous avions prévu car deux dons importants nous ont été faits par des amis qui, une fois encore, veulent rester dans l'anonymat. Le Conseil d'Administration leur est très reconnaissant et aussi tous ceux qui profiteront des améliorations rendues possibles : réfection d'une chambre des communs, installations de l'eau chaude dans toutes les chambres des communs et sur les lavabos des campeurs, réfection de la vannerie. Une autre amélioration sera certainement comprise et appréciée de ceux et celles qui ont eu l'occasion de loger dans les chambres 11 et 12 : le moquettage de l'escalier montant au deuxième étage. Des tables vont être achetées pour la bibliothèque. Le Conseil d'Administration mettra au point lors de sa prochaine réunion d'autres travaux importants.

Vous voyez, on recommence à penser à l'avenir. Le tonus printanier, c'est quelque chose ! Même si certains problèmes demeurent.

P. BARBIN.

INTER NI

Post la vintraj malvarmo kaj grizo venis la printempaj suno kaj mildo. Tiu « Inter Ni » estos iom malpli melankolia ol la antaŭaj. Eĉ se ĝi ne alportos solvojn la suno donas al la problemoj travideblecon kiu igas ilin malpli pezaj.

La Internacia Renkonto de Infanoj anonciĝas bona. El la tuta ĉeestantaro la Francoj estos verŝajne la plej multaj. Sed grupo de 35 germanoj, el kiuj 28 infanoj, aliĝis. Granda sukceso kiu ĝojigas nin. Sed la muroj de la kastelo ne estas eltireblaj kaj ni esperas, ke ni povos loĝi ĉiujn diverslandajn aliĝantojn. La someraj periodoj jam ricevis kontentigan nombron da aliĝoj. Fine de Aŭgusto LF-Koop organizos en Grésillon Kulturan Semajfinon. Ni de nun akceptas la aliĝojn.

Ni povos realigi pli da plibonigoj ol ni antaŭvidis dank'al malavaraj mondonacoj anonimaj. Tial ni povos venigi varman akvon en ĉiujn eksterkastelajn ĉambrojn kaj en la kampadajn lavejojn, ripari unu el la kursoĉambroj kaj provizi la ŝtuparon al la 2-a etaĝo per planktapiŝo. Pri aliaj gravaj plibonigoj la konsilio parolos okaze de sia aprila kunveno.

La reveninta printempo denove pensigas pri la estonto eĉ se kelkaj problemoj restas nesolvitaj.

NOS JOIES

Le 25 novembre 1981, est née Marina Kristos. Félicitations à Jean-Luc et Hélène Kristos et tous nos vœux à Marina.

Franceline Coste-Lefèvre est née le 17 janvier 1982. Félicitations aux parents et bienvenue à Franceline.

NOS PEINES

Mme France Jacquesson est décédée le 5 mars 1982. Mme Jacquesson était une amie de très longue date de la Maison culturelle puisqu'elle a participé à la vie de Grésillon depuis le début. Nous présentons toutes nos condoléances à Eve-Line et Florent Mathé. à Pierre et Josette Jacquesson et à toute la famille.

S'abonner
à Kulturaj Kajeroj
c'est aussi aider
La Maison Culturelle

ESPERANTO - DOMO

Grésillon, 49150 BAUGE (FRANCIO)

Telefono :

— dum la aranĝoj : (41) 89 10 34

— ekster la aranĝoj prefere skribu

KULTURAJ ARANĜOJ 1982

SOMERO

UNUA PERIODO

Alveno Dimanĉon 27-an de Junio — Foriro Sabaton 10-an de Julio

PRELEGOJ diverstemaj

— Diskutoj pri la prelegoj

— Studado de la lingvo

— Malkovro de la regiono

DUA PERIODO

Alveno Dimanĉon 11-an de Julio — Foriro Sabaton 31-an de Julio

KURSOJ por komencantoj kaj progresantoj

— Studado de la lingvo

— Manlaborado

— Malkovro de la regiono

TRIA PERIODO

Alveno Dimanĉon 1-an de Aŭgusto — Foriro Sabaton 14-an de Aŭgusto

STUDADO KAJ PRAKTIKADO de la lingvo

— **Prelegoj** kaj konversacioj

— Manlaborado

— Malkovro de la regiono

KVARA PERIODO

Alveno Dimanĉon 15-an de Aŭgusto — Foriro Sabaton 28-an de Aŭgusto

ARMETIOJ (fotoarto, korbofarado, librobindado,...)

— Praktika uzado de la lingvo

— Kurso por komencantoj

— Malkovro de la regiono

N. B. : Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj kvankam la celo de la kurso ne estas precize la preparado de tiuj ekzamenoj.

LIBRO--SERVO

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Adressez vos commandes à :

Janine VINCENT
B.P. 54
49150 BAUGE

Intitulé pour les chèques :
Maison Culturelle Esperantiste
C.C.P. : 1 485 39 P NANTES

Port gratuit pour commande au-dessus de 100 F.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Vient de paraître



Livre de lecture et d'étude pour enfants